


LA HIRUNDLIBRO

DE

ERNST TOLLER

ERNST TOLLER LA HIRUNDLIBRO







La Hirundlibro

de

Ernst Toller

El la germana lingvo tradukita
de Helene Wolff, Kleve

*

Propra eldono

En komizio ĉe „Heroldo de Esperanto“, Köln, Germ.

546845

Kreskinta en 1922

Skribita en 1923

Fortikaĵa malliberejo
Niederschönenfeld



82-1

Ksilografaĵoj de Fritz Dücker, Kleve

821.112.2-1

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Copyright 1924 by Gustav Kiepenheuer Verlag A.-G.
Potsdam.

Preso: „Heroldo de Esperanto“, Köln.

En mia ĉelo
nestis dum la jaro 1922
du hirundoj.

Amiko mortis en la nokto
Sola.
La kradoj gardis la mortinton.

Baldaŭ venos la aŭtuno.

Brulas, brulas profunda veo.

Forlasifeco.

Ho obtuza kanto de senfina monotonio!
Ho eterna unutoneco de senkolora forfluantaj tagoj!
Ĉiam
Tago estos
Kiel la lasta,
Kiel la sekvonta,
Ĉiam.

Tempo estas griza nebulo. Ĝi enpenetris la porojn de
via senlima sopiro.

La peceto da blua ĉielo estas trapikita de rustaj fero-
stangoj,

Kiuj ekiris el la krada truo de via ĉelo,
Vin almigris,
Al-
Migris
Al-
Migris ...
Unue vi defendis vin,
Sed la kradaĵoj estis pli fortaj ol vi.
Nun ili kreskas en viaj okuloj,
Kaj kien ajn vi rigardas,
Ĉie,
Ĉie vi vidas kradaĵojn.

Eĉ la infano, ludanta sur la malproksima, ho tiom mal-
proksima lupenfloranta kampo,
Estas kaptita inter la kradaĵojn de viaj okuloj.
Ho —

Viaj noktoj, viaj sonĝnoktoj — malesperaj arlekenaĵoj.

Viaj ungoj gratas la ĉerkokovrilon de surda forlasiteco.

Nenie floras la Miraklo.

Muziko estas —

Arbaroj estas —

Virinoj estas —

Floras ie la gesto de dolĉe
Kliniĝanta nuko.
Atendas ie mano, kiu estas
Tre karesema kaj plena de plej dolĉa varmo.

Nenie floras la Miraklo.

Jen la Miraklo!
La Miraklo!
La Miraklo!

Dancu, mia spiranta brusto,
Dancu, vi vundaj, katenitaj okuloj,
Dancu! Dancu!
Nur dancante vi rompos la katenojn,
Nur dancante vi ĉirkaŭmuĝos la stelojn,
Nur dancante vi ripozos en la diaĵo.
Dancu! Dancu!

Dancante revu la sanktan kanton de l' mondo!

De la bordoj de l' Senegalo, de la lago Omandabo
Vi venis, miaj hirundoj,
De la sankta pejzaĝo de Afriko.
Kio vin pelis al la malvarma Aprilo de l' malvarma Germanujo?

Sur la grekaj insuloj vi restadis,
Ĉu ne kantis gajaj infanoj gajan saluton al vi?
Kial ne konstruis vi templojn
En la honorindaj bukloj de l' Arkipelago?

Al kia sorto vi venis?

Ho, nia printempo
Jam ne estas la printempo de Hölderlin.*
La printempo de Germanujo fariĝis kiel ĝia vintro
Frosta kaj malserena
Kaj sen varmiga la
Amo.

La poetojn vi similas, miaj hirundoj.

Suferante pri l' Homo, ili Lin amas
Kun neniam estingiĝanta ardo,
Ili, kiuj pli profunde fratiĝis al steloj, al ŝtonoj, al ŝtormoj
ol al la tuta homaro.

La poetojn vi similas, miaj hirundoj.

* Hölderlin estis germana poeto (1770—1843).

Kie mi preparu al vi lokon, birdoj de la Libero?
Mi estas kaptito, kaj mia volo ne estas mia volo.
Se mi kantas kanton de la Libero, anoncas la gardisto:

La kaptito kantis kanton revolucion.

Tion la paragrafoj ne toleras.

Potencaj Sinjoroj estas la paragrafoj, kiujn la homoj metis super sin, ĉar ili perdis la senton. Vergojn ili portas en manoj. La homoj diras: Vergoj de justeco.

La vergoj de tiu ĉi domo nomiĝas: solaresto — litforpreno — manĝforpreno — kortmalpermeso — skribmalpermeso — parolmalpermeso — kantmalpermeso — legmalpermeso — lummalpermeso — furiozula kamizolo.

Vi, miaj hirundoj, scias nenion pri justeco kaj nenion pri maljusteco. Tial vi scias ankaŭ nenion pri paragrafoj kaj vergoj ...

Kiel mi serĉu por vi tabuleton?

Ja la domo, donita de l' homoj al mi por loĝado, estas bajonetgardata kaj dorndratĉirkaŭata. Ja resonas tage kaj nokte la kortoj de la senripozaj paŝoj de l' gardisto. Sed la vergoportantoj diras: Peceto da ligno estas danĝera.

Danĝera por la ordo kaj silento kaj sekureco de l' domo.

Helpema amiko!

Peceton da kartono vi helpis al mi fiksi super la ĉela pordo.

Ho, restu kamaradoj al mi, hirundoj!

Logantan la golfon ĉirkaŭflirtas
Timeme la hirundoj!
Unu ĝin tuŝas:
La vireto!
Jam mi ekkonas lin
Je la pli longe sagformiĝanta
Vosto, je la ruĝa
Pinta brustsigno.
Subite li ektremas.
Forflugas.
La virineto akre kriante
Kun li.

Ĉu vi antaŭsentis,
Kien mi intencis vin logi?

Ho, kiu memvole
Enloĝus
En ĉelo de kaptito?

Ses paŝoj tien,
Ses paŝoj reen.

Sen senco,

Sen senco.



La hirundoj revenis.

Ili restos! Ili restos!

Orienten rigardas mia ĉelo.

Orienten!

Ho Eŭropo, kiom vi estas mizera!
La bestoj de viaj domoj estas kiel viaj homoj,
Klinitaj kaj malbelaj, kriplaj kaj tranĉumitaj.
Ho, iliaj malgajaj okuloj!
Kie vi ilin kronas, vi kronas rekordojn
Kiel vi kronas la rekordojn de viaj homoj —
Sed ne ilian vivon! Sed ne ilian vivon!

Kiam ili kreskigas sian vivon?
Kiam?

Ili transdonas ĝin al idolo, portanta uniforman ĉapon;
tiu ĝin ordigas, katalogigas, ordonas devojn, skrib-
as naskiĝatestojn, soldatatestojn, edziĝatestojn, mort-
atestojn, metas krucon malantaŭ iliajn plenumitajn
nomojn, portas la plenskribitan registran volumon
en la registrejon. Tiel devas esti. Tiel vi servas Dion.
En eterneco, Amen.

Ekmarŝu, vi popoloj de l' Oriento, kaj
anoncu la benatajn himnojn de via
sankta senokupeco!!!

Unu besto tamen vivas en viaj domoj, vi homoj de
Eŭropo, tiu ne lasis sin dresi kaj eduki,

Tiu ne lasis sin kapti per dolĉeca logado kaj per via
diktatora minacado,

Tiu restis

Libera!

Libera!

Libera!

Venu al mi, la duoble kaptito:

Kaptito enĉeligita de kaptitoj ...

En tiu ĉi nokto

Dormis la hirundpareto en mia ĉelo.

Konstruestro de gotika katedralo,
Moderigu vian fieregon!
Kvadrojn vi uzis kaj arte skulptitajn ŝtonojn,
Kolonojn, pilastrojn, rozetojn kaj multekolorajn vitrojn,
Mortero estis por vi
La mizero de l' amaso, kiu malkare sin vendis;
Dediĉis vian verkon
Al Transo,
Al Morto.

Rigardu la hirundojn:

El malpuraĵo, el ŝlimo, trunketoj, el haroj ĉevalaj
Ili konstruas pie la noble volbitan neston,
Dediĉas ĝin
Al Tero,
Al Vivo.

Matene, kiam venas la gardisto,
Mi ektemas.
Se li vidus la neston,
Li ĝin ŝirus teren per malmilda gesto.

Ho, en la pasinta somero la milito kontraŭ bestidoj!
Kontraŭ tegmentaj defluiloj, firstoj oni militmarŝis,
Kiam mi iris al la korto,
Mi transpaŝis batalkampon.

Senhelpe flugadis cirkle la plendantaj patrinoj.

Paragrafo X: Kontraŭas la punplenumon
Toleri birdojn en la domo de l' puno.

Homoj ... Homoj ...

Mi vidis papiliojn ludi
En sunvibranta tagmezo.

Sed kie,
Kiam la suno malleviĝas,
Kiam noktoventegoj
Muĝas trans la teron
Per nigra plumaro,
Kie, plej graciaj infanoj de l' patrino dieca,
Tiam vi dormas?

Mi kredas:
Malfermiĝas por vi
Kalikoj de l' floroj,
Mi kredas:
Ripozlulas vin
La florsonorado en la katedralo de l' kaŝtanujoj.

En la nesto,
Enlitigite en blankaj lanugaj plumoj,
Kuŝas
Kvin brunpunktitaj ovoj.

Kvin festaj temploj de ĝermanta vivo.

Patrinoj de l' homoj —
Ve, ili jam ne estas
Festaj temploj de ĝermanta vivo.

En la mano de mia patrino
Enfendiĝas sulkoj.
Kiam ŝi min portadis,
Estis ŝia sango
Ombrumata de ĉiutaga mizero.
Revante
Mi kreskis
En la malhelo de l' varmiganta sino ...
Mia lakto: melankolio.
Mia korbato: funebro.

La moltonan kanton
Gardu la homo
En himna la ĥoro de l' mondo!

Ĉu vi scias, kiel hirundo flugas?

Mi vidis
Dum milito kaptitojn migradi
Tra plendantaj valoj de dispaŝitaj vilaĝoj.
El la vicoj de l' gapantoj
Elkurbigis sin
Virino.
Konvulsiaj manoj liberiĝis,
Supreniĝis krute en eteron de nigreta ĉielo,
Supreniĝis! Supreniĝis!
Ŝvebis!
Jubilis!
Kaj la serafa jubilo de voĉo:
André!!!

Sed tio ne estis kiel la flugo de hirundo.

Mi vidis
En malliberejo katenitajn homojn
Dormantaj ...
Songantaj ...
Ho vizaĝo stelradianta!
Katenitaj homoj
Songantaj!
Vi benata venkanto Songo!!!

Sed tio ne estis kiel la flugo de hirundo.

Flugo de hirundo — kiel nomi nenomeblaĵon?
Flugo de hirundo — kiel formi neformeblaĵon?
Se vivus Dio,
Lia kolero:
La elanĉanta sagflugo de la hirundo.
Lia rideto:
La korsaĝa ludo de la hirundo.
Lia amo:
La ebria sindono de la hirundo.

Eŭropo laŭdegas siajn aeroplanojn;
Sed mi, mi Numero 44,
Volas per la silentaj akordoj de mia koro laŭdegi
La flugon de la hirundo.

Kiu laŭdegos kun mi la flugon de la hirundo?
Ĉiujn mi invitas!
Kiu venos?

Maljuneta knabino,
Ĝiba infano,
Idioto!

Ho, ridinda triunuo de homa boneco!

Ni laŭdegas! Amen.
Ni kantas! Amen.
Ni adoras! Amen.

Ni laŭdegas la flugon de la hirundo,
Sed tiel nomiĝas la Revelacio de ĝia flugo:

La besto estas pli sankta ol la homo. Amen.
La floro pli sankta ol la besto. Amen.
Tero pli sankta ol la floro. Amen.
Sed plej sankta — la ŝtono. Sela. Sela. Sela.

Matene beligas al si la hirundvireto
Kun nobla gracio
Sian blue brilantan plumaron.
Ĉiam estas la hirundino malkontenta,
Mallaŭdas lin, disputas, babilaĉas, skandalas
Konfuzan lingvaĉon.
Digne la vireto finas
Sian matenan plum-aranĝon,
Apenaŭ respondas al la disputaĉemaj sonoj.
Tiam — hejdi! —
Li flugas en la rosan ĉielon.
Sed post nelonge
Li sidas sur la fenestra kadro,
Ĉirpas al la kovanta edzino
Gajan matenkoncerton.
Cirici, cirici,
Cicici,
Urrr.

Mi staras ĉe la nokta kradfenestro.

Songante ĉirpas la hirundino.
Vekite de la amanta voko
Sin movetas mallaŭte la hirundvireto.

Mi ne estas sola.

Ankaŭ luno kaj steloj estas miaj kamaradoj
Kaj la brilegantaj, silentaj kampoj.

Homoj, kiom mizeraj — viaj festoj!
Jaz-dancoj akraj de malbenita tempo!
Via vivtimo
Ekkrankas la aŭtomobilojn de Memforkuro.
Illuminu
La animon
Per lampionoj de elektra avido,
Kaj iluziu:
Ĝi estas ŝirmata.

Sed ĝi ne estas ŝirmata.

Tuta via bruego, via kriaĉado, grakado,
Via ĝojafiŝado, »gajaj-ni-estas«
— Hahaha —
Ne surdigas
La mallaŭte gratantan
Rodadon
De l' tri sekretaj ratoj
Malpleno — Timo — Forlasiteco.

Sed jam mi vidas vin,
Ŝanĝitan junularon de l' Revolucio.

Via ago: Generado.
Via kvieto: Konceptio.
Via festo: Nasko.

Oferonta
En la mortproksima batalo de heroa standardo,
Paŝonta
En maturiĝanta kampo de revanta printempo,
Jubilonta
En liganta danco de malligitaj korpoj,
Antaŭsentonta
En magia silento de stelumita nokto.

Jam mi vidas vin,
Ŝanĝitan junularon de l' Revolucio.

Vi miaj frataj, vi miaj kuraĝaj hirundoj!
Sur la korto mi staras.
En matenaj aeroj, etendante la potencajnflugilojn
Kun digno, velas nizo.
Mi aŭdas laŭtajn kriojn de ludantaj hirundoj.
De ĉiuj flankoj respondas vokoj.
Aroj da hirundoj alflugas.
Kiu donis la ataksignalon?
Per saga fortego ili sin ĵetas sur la reĝan birdon,
Kiu en siaj ungegoj tenas junan paseron.
Vi miaj frataj, vi miaj kuraĝaj hirundoj!
Sed kia neegala batalo!
Kviete, per pli movata flugilbato, sin defendas la atak-
ito.

Apenaŭ li atentis la etajn persekutantojn.
Kompatinda pasero!
Ree kaj ree atakas la hirundoj la rabiston,
Premegas lin kun fajra pasio.
Jam liaj flugilbatoj fariĝas pli rapidaj, pli nesinregaj ...
La malfortuloj venkis la fortulon!
Kun kolera krio, venkite de kunigita forto,
malfermas la nizo la kaptantajn ungegojn.
Tremante elfugas la senkonscia pasero,
En beataj flugoj festas la hirundoj la triumfon de l' ko-
muneco.

Kiam fine, bestoj, vi kunligiĝos
 Je ligo kontraŭ la homaro?
 Mi, homo,
 Alvokas vin!
 Vin, najtingaloj, blindigitaj per arda pinglo,
 Vin, virŝafoj, sufokitaj en kazematoj de gasplenaj
 ekzercaj ŝipoj,
 Vin, azenoj, plej mildaj bestoj, terenfalantaj sub vipo-
 batoj,
 Vin, strutoj, senplumigitaj je konvulsianta spiro kaj je
 sentanta koro,
 Vin, ĉevaloj, sensune laborantaj en pestumitaj minejoj,
 Vin, ursoj, dresitaj sur ardanta fer-mato,
 Vin, leonoj, domptitaj en cirko per ŝtala knuto,
 Vin ĉiujn, vin ĉiujn
 Mi alvokas!
 Vekiĝu!
 Venĝi ni volas
 La viktimojn de l' homo:
 Bestoj por frandado spirante torturitaj.
 Bestoj pro modkapricoj ride turmentitaj,
 Bestoj por ebriaj arenoj vante oferitaj,
 Bestoj en militoj sence dispecigitaj ...

Mi volas esti via kondukanto,
 Mi, renegato de l' homaro,

Mi volas vin gvidi kontraŭ la unu malamiko
 Homo.

Bestoj de la dezerto: Blekegu alarmon!
 Bestoj de l' ĝangalo: Kriegu ŝtormon!

Nenian diferencon ni akceptas.
 Blank- kaj nigruloj, flav- kaj brunuloj,
 Ĉiuj, ĉiuj terprofanantoj! Patrinmortigantoj! Stelo-
 rabantoj!

Sur la ĝiba nestrando
Sidas la hirundino.
Rigardas per seriozaj, atendantaj okuloj
(Kiel malmulte konas la homoj
Viajn okulojn, bestoj!)
Al la sankta loko de l' transformiĝo.
De tempo al tempo
Ŝi frapas per kraketanta beko
Al kalkkirasitaj mondoj
De graveda vivo.
Aŭskultante ŝi restadas.

Neesprimeble karesa sono!
Rapide alflugas la vireto,
Ekscitite, ageme, funkcieme
Ĉirkaŭflugas li babilante la neston.
Tuj kun petola ĝojo
Detenas la hirundino
La esplorantan flugon.
Fine ŝi paŭzas.
Tre milda fariĝas ŝia rigardo,
Tre mola kaj liberigita
Ŝia gesto.

Kaj la hirundvireto
Ekvidas
Sin,

Sin en kvin etaj
Blindaj, spirantaj
Vizaĝoj.

Lasu min partopreni
Vian feliĉon,
Kamaradoj.
Baptopatro mi estu al la kvin,
Kunzorganta, helpanta ŝirmanto.

Mi gratulas! Mi gratulas!

Hirundetoj, jen la maten', la mateno!
Nokte panjo ĉirpis al vi fabelojn,
Nun ŝi serĉas panon por beketplenigo;
Hirundetoj, jen la maten', la mateno!

Hirundetoj, jen la maten', la mateno!
Suno frapas kaj diras saluton,
Malfermu la brunajn rigard-okulojn;
Hirundetoj, jen la maten', la mateno!

Hirundetoj, jen la maten', la mateno!
Baldaŭ vi grandiĝos, tiam vi flugos
For trans la maron al la nigruletoj.
Hirundetoj, jen la maten', la mateno!

Grizaj silkaj haretoj
Kreskas kiel drolaj tufetoj
El rozekoloraj korpoj.
Surpikita, sur maldika
Tro longa kolo,
La kapo ...
Kiam iu malfermas la flavan beketon,
Blekas
Ridinde furioza faŭketo.

Ĉiam restas la nesto pura.
Kiam kuŝas en ĝi blanka kolbaseto
Kun nigra ringigita vosteto,
Ĝi estas prenata de la gepatroj
Kaj eksteren portata.

Diligente ili nutras
La idaron.
Unue la nutraĵo
Estas moligata en la kropo,
Dolĉe preparata per salivo,
Poste ŝtopata en la malsatajn buŝojn.
Se la patro
Nutras la idon dekstre,
Nutras la patrino
La idon maldekstre.
Sekreta leĝo
Regas.

Kiel infano, ĝojanta pro bildo, pro ludo
De pli ĉarmaj estaĵoj,
Mi alrigardas vin.
Nun mi vidas — konscia homo.

Kion vi alportas,
Sufokitan de unganta beko,
Al malsataj la idoj?
Besteton, similan al vi:
Vian etfratineton, la muŝon.
Katenita ankaŭ vi al la prakulpo de l' vivo!
Ve al ni!
Kio vivas, murdas.

Mi volas vin ami per pli profunda amo,
Ĉar mi scias, kion Sorto vin ordonas fari.

Estas malbeno de l' Tero:
Nenie
Spiras la vivaĵo
En dia senkulpo.
Kaj eĉ la mortaĵo
Devas mortigi.

Hej, hirundeto,
Kion vi ja povas!

Heziteme kaj tamen kuraĝe
Unu surrampas
La randon de l' nesto,
Levas gracie sian vosteton ...
Klaks!
Plenumis sian laboron.
Purigas
La etan postaĵon
Per starigitaj flugiloj
Kaj rapide, kun kapo levita,
Fiera kiel rusa caro
Ĝi rerampas en sian neston.

Vidis mi paŝi knabinon
En tritika kampo.
Brilas la ruĝa tuko,
Ruĝa tuko, ruĝa tuko
Aŭ ŝia kor'.

Kantis turdo malproksime
En la siringujo,
Sonis kiel amokanto,
Amokanto, amokanto
Aŭ — kiel mok'.

Unu someron ankoraŭ,
Du somerojn ankoraŭ,
Tralalala, Tralalala.

Se minacus danĝero, plendus la hirundino
Per penetra fajfado
Al ventoj sian surdan angoron.
De l' fenestro al nesto, de la nest' al fenestro
Ŝi flugas kviete.
En la nesto kaŭras,
Unu sin apogante al la alia,
La idoj.
Trans la nestrandon
Esploras la kapoj,
Kliniĝas antaŭen, retiriĝas malantaŭen, luliĝas
Laŭ la takto de l' patrina flugo. [ritme
Kiam laflugiloj de l' hirundino tuŝas
La varmigantan neston,
Ili etendas kiantajn bekojn,
Kutimite al karesa vartado.
Sed tuj kun grava pripenso
Ili ekmutiĝas,
Kaj en infanaj okuloj vekiĝas
Stranga lumado.

Logantajn sonojn ĉirpas la hirundino,
Restadante.

Ho ĉarma miraklo!
Antaŭenkrablas unu ido,
Etendas la etajnflugilojn...

Sin levas ...
Flugas,
Flugas
Ŝanceliĝante sed tamen gracie.
Al sia timo ĝi pruntedonas
La gracian geston de nobela bonmaniero,
Eksidas kun frapanta koro
Apud la feliĉa patrino.

Per laŭdo kaj bongustaj manĝaĵoj
Dorlotas la gepatroj
La kuraĝan idon.


Tiuj en la nesto
Insultkriegas kaj riproĉas.

Sur la proksiman tegmentrandon flugas la kuraĝa ido.
Scivoleme ĝi rigardas la mondon,
Rigardas unuafoje la mondon.
Amikoj, mi vidas kun ĝi unuafoje la mondon.
Jen sidas mia hirundeto. Super si la lumigantan
Varmigantan sunon; sub si la florantan spirantan teron.
La floroj, la arboj, la tegmenttegoloj,
La malproksimaj arbaroj, la telegrafdratoj,
Ĉiuj, ĉiuj salute klinis
La silentantajn kapojn.

Muĝas la maturiĝantaj spikoj
Ankaŭ por mi, la kaptito.
Volbiĝas la bluantaj ĉielo somera
Ankaŭ super ĉi tiu korto mortinta.

Mi spiras
En la tagmezo de dolĉa feliĉego.

Tero! Amatino!





De la kuraĝa ido lernas la gefratoj.
Kiel kun bela pacienco ĝi ilin helpas!

Kaj kelkajn tagojn pli poste ludflugas
Ekstere gepatroj kaj idoj.

Dum gaja ludo lernas la idoj
La festan arton de l' flugo ...

Vespere ili ne plu venis hejmen.

Vin aŭskultante, hirundoj,
Ridetas mi pri mia verkanta farado.

La Homo — centro de l' Universo?
Kial ne la hirundo?!
Levu do, levu do
La hirundon
Sur la tronon de l' sepa tago!

Pro la Homo
Vi mortigis homojn,
Pro la hirundo
Eble vi trovos la homon.
Kaj pli ol la homon.

Vin aŭskultante, hirundoj,
Ridetas mi pri mia verkanta farado.
Ridetu ankaŭ vi, amiko!

Kaj denove la hirundoj konstruas la neston.

Kaj denove: tagoj de amo varbanta, ebria plenumo.

Kaj denove mi havis pacan feliĉegon.

Sed ekstere batalas la fratoj ...

Kvar idoj, blindaj ankoraŭ, tremas en la nesto.
Ĉiam pli malofte hejmvemas la gepatroj.
Mizero! Mizero!
Nenia nutraĵo por la idoj en la estingiteco
De nebulaj tagoj.
Mizero! Mizero!
Vespere nudaj korpetoj sin premas
Al la patrina brusto, tiom senhelpe konfidante,
Kvazaŭ sin premus mortontoj al la koro
De sopire revata Dio.
La hirundino ploris.

Homo, ĉu iam vi vidis beston plori?

Frosto venis dum la nokto
En mortintmantelo.

Matene mi vekiĝis —
La nesto estis malplena ...
Mia koro estis malplena ...

Ho, karaj etaj hirundetoj!

Majesta silento.

55

Jam blovas aŭtunaj ventegoj
Trans la kampojn ŝvablandajn,
Kirliĝas en aeroj
Senheimaj folioj.
El marĉaj muskejoj de l' Danubo
Leviĝas la nebuloj,
Teksante
La palan mantelon
De senfina funebra plendo.

Por la vintra flugado
Kolektiĝas la hirundoj.

Por la vintra silento
Koncentriĝas mia koro.

Lastfoje ankoraŭ mi aŭdas la kanton de la hirundoj:

Inter miriadoj da domoj ni retrovos en la printempo
ĉi tiun grizan malliberejon,
Inter miriadoj da ĉeloj ni retrovos en la printempo
Vian ĉelon.

Nun vi forlasis min, plej karaj kamaradoj de mia aresto.

Kiom estis la ĉelo varma de via vibranta melodio,
de la spiro de viaj korpetoj, de la sonantaj elipsoj
de via faleganta flugo.

Vi kosmaj kamaradoj de mia somero,
Plej amataj vi,
Plej malproksimaj,
Plej proksimaj,
Kun humila dankemo
Mi memoras vian donaceman amon.

Bestetoj la homoj vin nomas,
Kaj sonas io aroganta en ilia voĉo,
kiam ili diras: bestetoj.
Ho, ilia malsaĝeco!
Mi lernis fariĝi devota antaŭ via nedirebla best-esteco.

Antaŭ ol la homoj ne retrovos la fundon de sia best-esteco,

Antaŭ ol ili ne estos,
Estos —,
Ilia batalo nur valoros
Novan batalon,
Kaj ankoraŭ ilia plej sankta transformiĝo
Valoros nur novan transformiĝon.

Epilogo.

Dum unu somero vivadis hirundoj en ĉelo de kaptito. Estis dia favoro por li. Kion ili donacis al li, pri tio li provis balbuti. Al la mallibereja estraro ne plaĉis, kion li skribis. Kiu scipovas sondi la severajn postulojn de mallibereja estraro! Sufiĉe, ne plaĉis al ĝi. Ĝi ordonis, ke la kaptito forlasu la ĉelon, kies krada fenestro estis direktita orienten, kaj zorgeme kun patreca pripenso donis al li alian ĉelon, kiu ricevis de norde sian mizeran lumon, kaj kiu ne povis fariĝi la hejmo de iu hirundo.

En la sekvinta printempo, en monato Aprilo, la hirundoj revenis. Venis de ie, el praarbara pejzaĝo kaj sunrevo, en la kvadraton de nuda, norda ĉelo. Ili trovis novan enloĝanton kaj estis pretaj, ankaŭ al li esti, kio ili estis al la antaŭa.

Venis iutage en la domon la libro, kiun estis forminta la unua kaptito kaj kiun li estis ĵetinta trans la muron neatingebla al la kaptmano de la gardistoj. Kelkajn tagojn poste kontrolistoj brue venis en la ĉelon, malsuprenŝiris „laŭordone“ la preskaŭ finitan neston per seninteresa, bruta gesto. Kiom ektimis la hirundoj, ne plu vidante sian etan loĝejon! Per siaj bekoj ili serĉante signis la duoncirklon de la nest-fundo, ĉirkaŭflirtis timeme, rigardis en ĉiun angulon de la ĉelo, trovis nenion.

*Jam la sekvintan tagon ili rekomencis konstrui.
Kaj ree la gardistoj detruis la neston.
La kaptito, masonisto el bavara vilaĝo, skribis la dek-okan de Majo 1924 la jenan leteron:*

Al Sinjoro Fortikaĝestro!

Mi petas sinjoron fortikaĝestron, bonvole lasi al la tiom severe elprovitaj paciencaj, treege utilaj kaj diligentaj bestetoj ilian tiom pene kaj malfacile akiritan nesteton. Mi deklaras, ke ili min neniel ĝenas kaj ankaŭ nenion difektas. Mi volas ankoraŭ citi, ke en diversaj malliberejoj troviĝas hirundnestoj kaj ke, je minaco de severa puno, ne estas permesite ilin detrui.

Altestime

Ruppert Enzinger el Kolbermoor.

La dudek-unuan de Majo la fortikaĝestro donis la lakonan respondon: „Hirundoj nestu en la stalo. Tie estas sufiĉe da loko.“

La nesto, intertempe jam rondiĝanta, malaperis laŭ verdikto. Sed al la kaptito oni donis alnordan ĉelon, la alian ĉelon oni fermis.

Konfuzitaj, pasie ekscititaj, komencis la hirundoj konstrui nestojn samtempe en tri ĉeloj. Duone la nestoj estis tavolitaj, kiam gardistoj ilin trovis kaj la kruelaĵo okazis.

En ses ĉeloj nestis la paro. Kiu povas scii, kio ilin instigis! Eble la espero, ke la homoj unu neston al ili permesos pro kompreno kaj iomete da boneco.

La ses nestoj estis forbalaataj.

Mi ne scias, kiomfoje konstruado kaj detruo sekvis unu la alian.

Sep semajnojn jam daŭradis la batalo, heroa, glora batalo de bavaraj jurprotektantoj kontraŭ la spirito de besta revolucio. Kelkajn tagojn la hirundoj ne plu konstruis. Ili rezignis.

Mallaŭte cirkulis la famo de kaptito al kaptito: „Ili trovis lokon en la lavejo inter la defluigaj tuboj, kie neniuj ilin trovos, nek la spiona rigardo de la gardisto, kiu ekstere palpesploras la kradojn, nek la spiona rigardo de la gardisto, kiu interne serĉas trovi malpermesaĵon.“ Malofte regis pli pura ĝojo en la ĉelkoridoro. Tiel la hirundoj tamen restis venkintoj en la batalo kontraŭ homa malboneco. Ĉiu kaptito sentis sin venkinto kun ili.

Sed la subaŭskultantaj gardistoj ... lumatene la lavejo estis senviva kaj malplena ...

Ne plu nestis la hirundoj. Vespere ili flugis en iun ĉelon, noktrestis tie intime sin premante unu al la alia, sur la konduka drato, forflugis frumatene. Baldaŭ la hirundvireto revenis sola. La hirundino estis mortinta, eble ĉar la homoj malpermesis al ŝi demeti fruktopezajn ovojn.

Postskribajo.

(Artikoleto trovita en ĵurnalo, tradukita kaj aldonita al la Hirundlibro kun permeso de la aŭtoro.)

HIRUNDGEPATROJ.

En la mirinda filmo »Abū Markūb« montras Bengt Berg maljunan elefantinon, kiu per mallertaj movadoj de sia rostro lernigis al ido, kiel sin kaŝi en la stepherbo kontraŭ malamikaj persekutoj.

Tio memorigis min je kortuŝa epizodo, kiun mi observis ĉe la hirundpareto, kiu nestis en mia ĉelo.


La unua ido estis fine forlasinta la neston, je la ĝojo de l' gepatroj, kiuj ĉirpante akompanis ĝin, estis eksterenfluginta kaj sidis nun supre sur la tegmento. La gepatroj flugis cirklojn, spiralojn kaj aliajn artajn figurojn por montri al ĝi, ke la flugado ne estas nura celservo, sed ke ĝi povas esti sencela gaja ludo. La ido alrigardis atente. Subite, kvazaŭ ĝi donus al si mem kuraĝan puŝon, ĝi leviĝis kaj — bums! — kuŝis sur la tero. La gepatroj ekscitite fajfante ĉirkaŭflugis la idon. Tiu vane klopodis suprenflugi kaj fine sidrestis.

„Se la infano ne volas aŭdi,“ pensis panjo, „oni devas montri al ĝi; eble ĝi komprenos.“ Tial ŝi mal-suprenrapidis, sidis kelkajn sekundojn apud ĝi, mon-

tris kiel oni sin levas. Certe dekfoje ŝi faris tiel. La etulo ne volis.

Nun mi vidis, kiel patrino rapidis al patro, kiun oni ekkonas je la pli longe sagiĝanta vosto, kaj faris signojn al li. Ambaŭ flugis al la ido. Patro eksidis dekstre, patrino maldekstre; ili etendis siajn flugilojn; ĉiu ŝovis unu sub la idon, tiel ke ĝi sidis kvazaŭ sur etendita mato. Tiamaniere ili alportis ĝin, ambaŭ nur uzante la liberan flugilon, al la nesto, kaj zorge ĝin englitigis.





Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678410

